

5. "Sen scio kaj bonvolo ne eblas konstrui novan universalan civilizacion, ĉar, fakte, la socio spegulas la kvalitojn de la homoj, kiuj konsistigas ĝin." (p. 194)

6. "Tiu kultura movado (en la senco de la spirita ideo-forto, rim. de la recenzinto) ekzistas jam, ĝi estas la esperantismo kun sia supernacia lingvo Esperanto kaj ties ideologio, la homaranismo." (p. 200)

Ĉi tie ne estas la loko por denove diskuti pri tio, kio estas esperantismo, sed tutcerte la esperantistoj ne reprezentas unu ideologion, la homaranismon (se oni entute rajtas nomi homaranismon ideologio). Tiom pri la enhavo de la libro.

La lingvaĵo ne estas kontentiga. Krom svarmantaj preseraroj kaj iom arbitra metado de komoj ĝenas kelkaj lingvaj eraroj, ripetiĝantaj tra la tuta libro. Tre ofta estas malĝusta uzado de la akuzativo kaj mankanta nombra konformeco (singularo resp. pluralo) inter substantivo kaj atributiva au predikativa adjektivo. Ĝena estas la daŭra uzado de "tio" anstataŭ "la" en frazoj kiel "La plej grava estas..." kaj la uzado de "nomata" anstataŭ "tiel nomata". Tipe hispana ŝajnas la erara "e" ĉe la vortkomenco (estariĝi, estrukturi, Espartako, Eslovenio), sed inverse mankas la komenca "e" ĉe "establi". Ankaŭ kelkaj propraj nomoj estas malĝustaj (Bismarch, Hinderburg).

Resume: post la legado de la libro mi unue bedaŭris, ke mi ne havis partner(in)on por diskuti kun li/ŝi pri la problemoj, prezentitaj en la libro, kiuj ja estas ege gravaj, ĉar ili tuŝas la transvivon de la homaro entute. Ni danku al la aŭtoro, ke li dediĉis sin al tiu plej grava demando. Dezirindas seminario pri la temo, por kiu la libro bone tagus kiel baza materialo.

Adreso de la recenzinto:

Dieter DUNGERT
Olvenstedter Grund 25
DE-39130 MAGDEBURG
GERMANIO

RECENZO

Steven PINKER

The Language Instinct: How the Mind Creates Language
William Morrow and Company, New York (US) 1994

La Lingva Instinkto: kiel la Spirito Kreas Lingvon

germanlingva traduko de Martina Wiese
editita en Kindler Verlag GmbH, München (DE) 1996
ISBN 3-426-40267-X (560 p. 49.80 DEM)

St. Pinker, psikolingvisto en la famekonata *Massachusetts Institute of Technology (MIT)*, Boston, faras hipotezon: homoj de ĉiuj etnaj grupoj, ekzistantaj kaj formortintaj, estas kaj estis provizitaj per ennaskigita lingvoinstinkto. Ĉu ekzistas pruvoj por tiu eldiro, ke la homa lingvo estas heredigebla parto de la biologia ekipaĵo, komparebla al instinkto, ke la lingvo havas minimume ennaskigitan komponanteron?

Lingvo kiel speco de instinkto estis menciita la unuan fojon jam 1871 de *Darwin*. La denova ideo baziĝas ne nur sur pli fruaj teknikaj analizoj de la frazstrukturo, sed sur rektaj observadoj de la ĉiutaga t. n. primitiva lingvouzo. Jam 3-jaraj infanoj scipovas ĉirkaŭ naudekprocente ĝuste formi frazkonstrukciojn, kiujn ili antaŭe neniam audis - ili evidentiĝas gramatikaj geniuloj, tute kontraŭe al aliaj kapabloj en tiu aĝo. Lau *Chomsky* infanoj devas esti provizitaj per ennaskigita plano, kiu estas komuna al la gramatiko de ĉiuj lingvoj. Tia universala gramatiko (en la senco de prilaborado de informoj el la ĉirkauaĵo) ŝajnas esti al *Pinker* "mentala softvaro", kiu en la unuaj vivjaroj devas esti programata per iu parolata lingvo, ĉu japana ĉu araba.

Ekzistas en la ĉ. 6000 lingvoj (de *L. L. Cavalli-Sforza* kunigitaj en 24 lingvofamilioj - genetika arbo lau gengrupoj) ne nur multaj idiosinkrazioj, sed ankaŭ frapantaj universalajoj de hipoteza universala gramatiko (*N. Chomsky*), formuligeblaj kiel implikajoj

(*J. Greenberg*) lau la sperto: se iu lingvo elmontras x , tiam ŝi elmontras ankaŭ y .

Lingvo estas universale trovebla en ĉiuj homaj socioj: ekzistas fakte ĉieco de kompleksaj lingvoj en ĉiuj kulturoj lau ekkonebla konstruopiano. Kaj eĉ se la diverslingvaj parolantoj ne povas kompreni unu la alian, troviĝas en ĉiu parolataj lingvoj kaj eĉ en la gesta lingvo gramatikaj komunajoj lau skemo de universala gramatiko kun subjektoj, objektoj, verboj, fraz- kaj vortstrukturoj por demandoj.

Homoj ne pensas angle, ĉine - ili pensas en "pensado-lingvoj", kiuj devas esti multe pli analogaj unu al la alia ol al la respektivaj parolitaj lingvoj. Tiu homa pensadolingvo formas kvazau iun universalan mentalo-lingvon, la "mentalan".

Cela kerno de la lingvo-instinkto povas esti la bezono, ke lingvo peras novaĵojn, ĉe kio "lingvo faras senliman uzon de limigitaj rimedoj" (*W. von Humboldt*) unue helpe de diskreta kombinatorika sistemo de la gramatiko, ties organizaj strukturoj devas ĉeesti denaske, kaj due helpe de la vortoj, de la morfologio.

Pri la fakte grandioza lingvomulto ne ekzistas konkluda respondo de la lingvistoj; la teoria fizikisto *F. Dyson* proponis jenan kialon: lingvodiverseco estas la vojo, sur kiu la naturo ebligis rapidan evoluon helpe de kreado de izolitaj etnaj grupoj, kiuj profitis de nemiksita biologia kaj kultura evolucio.

Darwin komentis en 1874 evoluo-avantaĝon per la konstato, ke la formiĝo de diversaj lingvoj kaj specioj baziĝu sur samaj kondiĉoj elmontrantaj homologiojn kaj analogiojn, klasifikeblaj nature lau ĝiaj devenoj kaj artemaniere lau iuj karakterizaĵoj.

Se lingvo estas vera instinkto (kaj ne nur ilo por la solvado de problemoj) ĝi devas esti fiksita ĉe identifebla pozicio en la cerbo, tie instalita per specifaj genoj - sed gramatikogeno ĝis nun ne estas malkovrita. Tamen estas bone konata, ke okazas tre specifaj t. n. afazio, disfazioj kaj sindromoj, kiuj estas lokalizeblaj en la cerbo kaj rilatas al disturboj de la gramatiko kaj kiuj eble supozigas difektitajn genojn sur specifaj kromosomoj.

Esploradoj kune kun pacientoj, kiuj suferas je heredigitaj lingvoperturboj, povas riveli tiajn informojn. Helpe de la pozitrono-

emisio-tomografio (*PET*) kaj de kernspintomografio (*MRI*) certaj areoj de lingva aktiveco estas markeblaj (la *Broca*-centro, la *Wernicke*-centro), kiuj respondecas pri lingvaj sindromoj. Neurobiologoj taksas, ke ĉa. la duono de niaj 50000 - 100000 genoj respondecas pri la efikeco de la cerbo. Sed DNS estas tre diskreta kombinatorika kodo, pro tio povas esti, ke ĝuste la malfunkciado de unusola geno povas kauzi ekz. disturbon de la gramatika retsistemo (same kiel ekz. la neŝaltado de unu ĉipkonekto paralizas tutan motoron - reciproke neniu pretendus, ke la motoro ekzistas nur el tiu ĉipo).

Nur: lingvoinstinkto, sole rezervita al la homo, ŝajnas esti neakordigebla kun la *Darwin*-a evoluciteorio, ĉar fakte la homa lingvo diferenciĝas draste de la besta interkomunikado. Sed hodiaŭ ni bone scias, ke la evolucio ne kreas unudirektan evolu-eskalon, sed disbranĉiĝitan evoluon - arbuston montranta forpereitajn transirajn stadiojn kun analogiaj kaj homologiaj markoj de ebla lingvokapableco.

Ekestas do la demando, ĉu ekzistas homologiaĵoj de la homa lingvo en la besta regno.

La ekevoluo de la lingvo estas taksita nur en la tempo antaŭ 100000 jaroj ĝis al la plej malproksima aĝolimo antaŭ 5 milionoj jaroj, kiam disiĝis la hominida de la ĉimpanza linio. Pro tiu relative mallonga tempospaco estas lingvo, por la evoluo-biologo *St. J. Gould*, subprodukto de rapida pligrandiĝo de la cerbo, kontraue al *Pinker*, por kiu la pligrandiĝo de la cerbo estas la subprodukto de la plibonigitaj homaj kognitivaj kapablecoj - inteligenco kaj ĝuste lingvo.

Ofte oni eliras de la premiso, ke vortoj stiras la pensojn. Por *Pinker* kontraue estas la imago, ke pensoj (kategorioj, nocioj) kaj lingvo estu identaj, konvencia absurdeco; ĉar la kerno de ia legitaĵo au auditaĵo ne estas identigebla per iu sinsekvo de vortoj.

Necesas emfazi, ke vorto estas nenio alia ol simbolo, kaj la relacio inter ĝia lautkonturo kaj ĝia signifo estas absolute arbitra, same kiel aliaj lingvistikaj simboloj ekz. en la surdo- kaj gesto-lingvo.

Se pruveblas universalaj implikajoj en ĉiuj lingvoj, tiam du eblecoj estas penseblaj:

- lingvo estiĝis nur unu sola fojo, kaj ĉiuj lingvoj devenas de tiu protolingvo kaj konservas specifajn markojn; tiu hipotezo estas konsekvenca, se oni intencas serĉi la originan protolingvon; nur, laŭ opinioj de lingvistoj, ĉiuj ŝpuroj de iu lingvo estos malaperintaj en la posteuloj post 10000 jarojn;

- lingvoj respregulas universalajojn de la pensado aŭ de la mentala informprilaborado, respregulas procedojn laŭ moduloj, kiuj eĉ ne estas lingvospecifaj, sed universalaj.

Se lingvo estas instinkto - skribita lingvo ne estas. Skribo estas artefarita aranĝo, kiu interligas vidadon kun audadon. Tamen, skribo spilas la lingvon je diskretaj punktoj. La simboloj de ĉiuj konataj skribsistemoj priskribas nur tri formojn de la lingva strukturo: la morfemon, la silabon kaj la fonemon; ĉiuj modernaj fonemaj alfabetoj cetere ŝajnas deveni de tiu litero-sinsekvo-sistemo, kiu estis inventita de la Kanaanitoj ĉ. 1700 a.

Sed neniu skribsistemo disponas pri simboloj por faktaj sonunuoj, identifiikeblaj per osciloskopo aŭ spektogramo. La faktaj sonunuoj distingiĝas en la diversspecaj kontekstoj pro la adaptiĝo al la respektivaj areoj de la artikulacio. (Pro tio *G. B. Shaw* batalis por reformo de la angla lingvoskribo kaj testamente asignis monsumon al tiu, kiu priskribu la anglan alfabeton tiel, ke ĉiu sono de la parolata lingvo respondu ĝuste al unu simbolo!)

Pinker cetere mencias Esperanton kiel racionale konstruita lingvo kaj la *Orwell*-an 'Novlingvon' el la romano "1984" kiel ekzemplo de perlingva manipulado. Kaj ne mankas malica aludo de la lingvomortiganta inundo per la informado-sauco far de la elektronikaj medioj, kiun li signifas "kulturan nervogason".

Entute, la unuaj paŝoj al homa lingvo estas ankoraŭ sekreto. Tamen, la direkton povas montri la *Darwin*-a teorio de la natura selekcio. Nur la natura selekcio eksplikas eventojn, kiuj estas ekstreme neprobablaj. La efikeco de la teorio pri la natura selekcio konsistas el la interplekto de du ideoj: unu estas la ideo pri ekzisto de konstruopiano, la dua konsideras la reproduktigajn sukcesojn de la antaŭuloj de la organismoj.

La teorio de la natura selekcio kiel unusola ebla, natura ekspliko de la lingvoevoluo pridubas la afektadon pri la multcitata nekomparebleco de la lingvo.

Postrimarkoj

Al genetika dispozicio indikas esploroj pri la gesta lingvo de *S. Goldin-Meadow* kaj *C. Mylander* (Ĉikago) ĉe ĉinaj kaj usonaj infanoj (*Nature*).

A. *Monaco (Oxford)* konstatis heredan gramatikan lingvodisturban surbaze de difektita geno 'SPCH1' sur kromosomo 7 (*Nature Genetics*).

Spite al rimarkebla spirita handikapeco pro *Williams-Beuren*-sindromo (evidente kuplita kun gendifekto sur kromosomo 11) la afektitaj personoj (t. n. *idiots savants*) scipovas senĉene kaj eĉ poezie paroli, por *Pinker* forta indiko, ke lingvotalento kaj inteligenco nur la rezerve de certaj kondiĉoj estas kuplitaj, kaj ke lingvo povas esti rigardata disigita de aliaj kognitivaj kapablecoj. Laŭ li ni lernas lingvon ne tiel kiel la lernado de lertecoj, sed ni scias apliki la gramatikon tiel kiel araneo scipovas teksti la araneojn.

Lingvo ŝajnas esti aspekto de konscio. Nur, unuarange estas tio, kiun lingvo parolas, nur diraĵo - tiukaze estas lingvo nur ilo.

Ĝenerale ni supozas (aŭ imputas) ke tio, kiun la cerbo perceptas ('ver-prenas'), ekzistas. La rezulto de tiu perceptado per la cerbo estas unuavice konstrukto; ĉu ĝi estas konklude ligita al konscio? Ni hodiaŭaj *idiots savants* scias, ke restas sen sukceso, serĉi en la preskaŭ malplena radiokesto la parolanton de la audebla voĉo; sed ni scikredas, ke li ekzistas en iu malproksima sendostacio kaj parolas pere elektromagneta kampo.

Same ekzistas por *R. Sheldrake* diversaj aspektoj de unu morfa kampo, kaj por li estus la cerbo kaj la lingvo sen iu ekzista morfogena kampo kiel radiokesto sen sendokampo; ĉu ekzistas lingvo en la homoj laŭnorme tia kampo, kvazau kiel io kolektiva konsciaĵo?